

## Nova redaktisto, nova aspekto

Estas granda honoro kaj granda defio por mi transpreni la taskon redakti kaj eldoni unu el la plej longdaŭraj revuoj esperantlingvaj. Defio, kiun mi volonte antaŭgajante akceptas, des pli, ĉar mi povas min konsideri ano de tre bona teamo. Kelkaj aferoj verŝajne ne ŝanĝiĝos, ekzemple daŭre estos kvar eldonoj jare. Ni konservos la altan lingvan kvaliton de la revuo danke al spertaj kontrollegantoj.

La plej granda ŝanĝo estas, ke la Scienca Revuo estos havebla pere de reta disvastigado. La kvaronjaraj eldonoj estos haveblaj en la interreto. Fine de ĉiu jaro aperos la jara volumo en papera formo. Tiu jara volumo estos kvazaŭ libro ducentpaĝa. Tion decidis la estraro de ISAE, ĉar vere utilas la reta eldono. La arkivo estos atingebla, kaj la enhavo estas pli facile stokebla kaj kopiebla. Ĉar ni ankaŭ volas konservi la paperan eldonon, ni volas, ke ĝi estu laŭeble plej alloga, kaj akirebla ankaŭ pere de libroservoj.

Kelkaj novaj aferoj enkondukiĝos, ekzemple Scienca Revuo havos terminologian sekcion. Tio ĉefe eblas, ĉar ni havas fakulon pri terminologio en nia teamo, nome MÉLANIE MARADAN. La rubriko "Scienco kaj Esperanto" temas pri ajna rilato de scienco kun Esperanto, kiel ekzemple prezento de famaj sciencistoj Esperantistaj, gravaj sciencaj verkoj en Esperanto. Tiu rubriko povas havi aparte gravan signifon por la scienca kaj faka agado en Esperanto, se troviĝos sufiĉe da aŭtoroj. Por pli emfazi tiun signifon, aperas kiel unua artikolo de tiu rubriko [artikolo, kiu priskribas la ĝiajn celojn kaj eblojn \(v.p. 9\)](#).

Alia rubriko estos "Scienco kaj socio". Ĝi okupiĝas pri la influo, kiun scienco havas al la socio kaj inverse. Ekzemplaj temoj estas "nuklea energio", "genteknologio" ktp. Do ankaŭ nesciencistoj sentu sin alvokitaj verki kontribuon por tiu ĉi tradicia revuo. Pli detalaj instrukcioj por aŭtoroj estas troveblaj en la [artikolo sur paĝo 44](#).

Kiel nova redaktisto de Scienca Revuo mi forte alvokos al ĉiuj verki artikolon. Ne nepre estu ĝi scienca artikolo. Ankaŭ povas esti por unu el la aliaj rubrikoj, kiujn Scienca Revuo ekde nun havos. Antaŭgajante viajn artikolojn mi deziras al vi agrablan legadon de kaj tiu ĉi kaj la estontaj numeroj.

Vi trovas la Scienca Revuon nun en la reto ĉe <http://www.sciencia-revuo.info>. Tie vi povas interalie legi artikolojn, proponi novajn artikolojn, kandidatiĝi kiel revizi-anto aŭ provleganto. Estas multe da laboro bone ekfunkciigi tiun sistemon kaj ankaŭ mankas kelkaj tradukoj al Esperanto. Do ni ĝojas pri rimarkigoj pri eraroj.

Ludwigsburg, marto 2012

JOHANNES MUELLER